En la 28-a de Junio 1952 Frato Tadeo, rektoro de la Franciskana Seminario, transdonis al mi paketon, kiun li ricevis de Ismael Gomes Braga kun la peto, ke ĝi estu transdonata al mi nur en tiu tago. La paketon mi malfermis scivole.

La surprizo estis granda, sed la ĝojo eĉ pli granda: Plena Vortaro de Esperanto. En ĝia unua paĝo estis dediĉo, kiun skribis kaj subskribis la sendinto kun aliaj dek kvin aliaj samideanoj, inter Ili Brás Cosenza kaj lia edzino Cedilha Neto, kunfondintoj de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, ĝis nun aktiva. Jen liaj vortoj, sed la laŭdojn tiam mi ne meritis, kaj eĉ ne nun:

Al nia klera samideano
Geraldo Gomes Matos, genia poeto, en la tago de lia 21-a datreveno, kun frata saluto de la samideanoj kaj samideaninoj subskribantaj.
Rio de Janeiro, la 28-an de Junio 1952
...
Ismael Gomes Braga

Kelkajn monatojn poste ŝajne mi jam estis traleginta ĉiujn ĝiajn paĝojn de la vortaro de 1947, kaj ne pro la kvalito, sed pro sopiro pri mia tia aĝo, mi redonas ĉi tie du rondelojn, kiujn PV diktis al mi:

Dio kaj Satano

I

Kontrolu en Plena Vortaro,
Se iam vin trompos memor´,
Ĉar tie kaŝiĝas trezor´,
Minejo por stilo-preparo.

Por gardi vin kontraŭ eraro,
Dum via verkista deĵor´
Kontrolu en Plena Vortaro,
Se iam vin trompos memor´,

Sed zorgu pri ĝia deklaro:
Ĝi diras – verŝajne ignor´! –
Ke pezis pro Dia rigor´
Sep plagoj sur la egiptaro!

Kontrolu en Plena Vortaro.

II

Kontrolu en via Biblio,
Se tion vi nepre ne kredas.
Dolore min premas, obsedas
Neglekto al Diro de Dio.

Informojn pri la historio
La libro Mosea posedas:

Kontrolu en via Biblio,
Se tion vi nepre ne kredas.

Memoru, ke en Egiptio
Dek plagoj okazis – jam tedas,
Ke tiel impulse mi pledas...
Ni iru! Antaŭe, pri tio

Kontrolu en via Biblio!

Mia sola konsola konstato estas tio, ke mia skribo tiama eĉ estis legebla, sed nun... fi!...

Geraldo Mattos